



Bildo 1. La modelo de ritigo de sociala konflikto

'Lexicon silvestre' Leksikono kaj Vortaro kun Novaj Spertoj

Karl-Hermann SIMON, Ingward ULLRICH
kaj Horst WECKWERTH

Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a. Eberswalde

Antaŭparolo

Per tiu ĉi artikolo ni daŭrigas la informojn en "Scienca Revuo" (4) pri la laboro kadre de la "Lexicon silvestre" - projekto (3). En la artikolo, publikigita en 1994, la atento estis koncentrita sur novaj vortradikoj de la unua parto de "Lexikon silvestre" (Ls). Ĉi tie nun estas raportataj pri esencaj trajtoj de la verkaĵo, ĉar troviĝas pli kaj pli da intereso ankaŭ inter esperantistoj.

1. Celo de "Lexicon silvestre"

La mastrumadaj, la ekonomiaj agadoj, la merkato pli kaj pli internaciigas. La forstfaka sfero ne restas sentuŝita per tiu ĉi evoluo. La efikoj de tiu ĉi homaj agadoj, kiuj hodiaŭ ankoraŭ apenaŭ efektive konsideras la rezulton de la ekspluato de la naturo, transaltas neintencite ĉiujn landlimojn. Necesas la senperaj kunagadoj de la forstistoj, por kontraŭagi la malbonajn rezultojn de tiu evoluo, kiujn oni povas ekkoni jam en multaj arbaroj de Eŭropo. Estis forstscienculoj, antaŭ pli ol cent jaroj, kiuj estis la unuaj, fondintaj internacian asocion de esplorinstitutoj, por unecigi, plibonigi siajn agadojn en la arbaroj. Tio estas hodiaŭ postulo al ĉiuj geforstistoj. Ĉu ili havas la necesajn helpilojn?

Sur la kampo de la forsta fako la situacio pri disponeblaj tradukhelpiloj ne grave pliboniĝis dum la lastaj 20 jaroj. Ĝenerale al uzanto de forstfaka vortaro estas prezentitaj unu aŭ kelkaj terminoj por la serĉita esprimo en la cellingvo. Sed pro la plursenceco de multaj terminoj la rezulto de traduko kelkfoje estas ne kontentiga. Do, la interkompreniĝo trans lingvaj limojn restas kelkfoje ne kontentiga.

Klarigoj nur rare estas indikitaj en forstfakaj vortaroj, kiel ekz. en "Multilingual Forestry Terminology Series" (MFTS) (5,6,7). Tiu ĉi verko eliras el anglaj terminoj kaj estas ekde 1971 tradukita bedaŭrinde nur en mal-multajn lingvojn, kiel la francan kaj italan. Laŭ nia opinio la estiĝintaj malfacilaĵoj dum la tradukado de la verko en aliajn lingvojn estas la ĉefa kaŭzo, ke oni ne daŭrigis la grandiozan ideon de tiu ĉi verko. Tiaj malfacilaĵoj estis neeviteblaj, ĉar la verko eliras de terminoj. Tial grupo de esperantistoj komencis en 1981 novan plurlingvan verkon sur alia bazo.

2. Novspeca labormetodo pri "Lexicon silvestre"

Pro la fakto, ke ĉiu nocio, dum ĝia estiĝo tuj ricevas nomumon/terminon, la opinio estas komprenebla, ke oni eliru de termino ĉe la plibonigo de internacia faka interkompreniĝo. Sed dum la prilaborado de MFTS montriĝas denove, ke tio estas eraro.

Nia bazo estas la ekkonoj de la terminologia scienco, fondita speciale de Eugen WÜSTER (10) antaŭ pli ol kvindek jaroj. Elirpunkto de terminologia prilaboro de faklingvo estu la nocio kun ĝia difino. Sur tiu bazo oni kreu la faklingvon, kiu konsistas ĉefe el la nomoj de la nocioj, la terminoj. Nur la plej alta ŝtupo, la kreado de normterminoj, ebligas racian, unusencan interkompreniĝon de fakuloj. Ĝis la atingo de tiu ĉi ŝtupo por la forstfaka lingvo restas ankoraŭ longa vojo.

Kvankam ni kolektas en Ls por la etnolingvoj nur la respektivajn ekzistantajn terminojn, la celon, la kreadon de normterminoj, oni ne perdu el la okuloj. La kreado de normterminoj estos la tasko de respektivaj nacilingvaj fakkomisioj.

Pro la neceso, ke la intencita vortaro enhavu difinojn, la nova vortaro nepre havas leksikonajn trajtojn. Sed por konservi por la Ls ankaŭ en sia papera formo la amplekson kaj karakteron de vortaro, oni devas krei koncizajn difinojn. Tio postulas, ke oni uzu en la difinoj per referenciloj la nociodifinojn, kiuj jam ekzistas aliloke en Ls, sen ripeti ĝian enhavon. Tiamaniera strukturo de Ls havas la avantaĝon, ke uzanto pli facile ekkonas la netaĵon de nocioj kaj nociosistemoj, el kiuj la forsta fako konsistas.

3. Amplekso de "Lexicon silvestre"

Origine estis projektite, ke Ls ampleksu nur la nociojn de la forsta fako en pli malvasta senco. Sed intertempe fakuloj proponis, ke oni ankaŭ konsideru fakokampojn, kiujn iam ankaŭ forstistoj kultivis, sed jam evoluis al memstaraj fakokampoj, kiel ekz. la landuzado kaj naturprotektado. Ĉe tiu plivastigo gravan rolon ludas la fakto, ke la centralo de Ls-projekto troviĝas ĉe la fakaltlernejo Eberswalde, kiu inter alie instruas tiujn ĉi fakojn.

Ekde la komenco de la laboro la iniciatintoj konsentis, ke provizore Ls ne enhavu la nomojn de objektoj, por kiuj ekzistas internacie akceptita nomenklaturado, ekz. ĉe plantoj kaj bestoj, kiu ebligas unusencan interkompreniĝon.

Ni allasas en Ls unu escepton de nia principo, ke iliropunkto estu nocio. Pro la praktika bezono de la uzantoj ni traktas unopajn objektojn, kiuj havas gravan signifon por la respektivaj fakuloj. Ekzemploj estas la IUFRO (International Union of Forest Research Organizations) and ITTO (International Tropical Timber Trade Organization).

Origine la amplekso de Ls estis kalkulita je ses partoj, ĉiu po mil nocioj. Ni subtaksis la nombron de ekzistantaj nocioj kaj ĉiutage novaj nocioj kaj iliaj nomumoj estiĝas.

4. La kunlaborantaro

Dum la unuaj jaroj la kunlaborantoj estis nur forstistoj, kiuj scipovis Esperanton, ĉar la interkompreniĝa lingvo estis nur Esperanto. Ĉar ni ne trovis por ĉiuj lingvoj forstistojn kun tia lingva kono, ni ankaŭ akceptis ekde 1983 aliajn forstistojn en la laborteamo. Ni klopodas indiki ĉiujn nociodifinojn samsence ankaŭ en la angla, germana, franca, hispana kaj rusa lingvoj, kaj tial ankaŭ forstistoj, kiuj scipovas unu el tiuj ĉi lingvoj, povas senpere kunagadi.

Dekomence ĉiuj kunlaborantoj laboras senpage por tiu ĉi projekto. Nur tri jarojn la Laboroficejo Eberswalde disponigis 8 personojn kadre de tiel nomata "aranĝo por havigo de laboro", kiuj estis pagitaj per publikaj rimedoj.

La mankaj financaj rimedoj forte limigas la nombron da kunlaborantoj. Intertempe estas pli ol 100 fakuloj el 33 landoj, kiuj deklaris sin preta kunlabori, sed nur malmultaj faris tion laŭ komisiono de iu ajn institucio.

5. Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a.

En la jaro 1993 naŭ kunlaborantoj de Ls fondis publike utilan asocion kun la nomo "Förderverein 'Lexicon silvestre' e.V.". Tiu ĉi nun estas la sola portanto de la projekto kaj reprezentas la interesojn de la aŭtoraro. Ĉar la forstterminologia laboro ĝis nun preskaŭ ne havas daŭran solidan bazon en iu ajn institucio, ni urĝe bezonis tiun patronan asocion. Tio validas ne nur rilate Germanion. "Lexicon silvestre" estas multlingva afero kaj la forstterminologio bezonas daŭran prilaboradon en landoj kun konsiderinda forsta fako. Ĝis nun 39 fakuloj el 12 ŝtatoj estas asocianoj.

Ĉiujare la Patrona Asocio aranĝas kune kun aliaj asocioj prelegkunvenon "Forsta terminologia laboro". Tiu ĉi kunveno ebligas interŝanĝon de informoj kaj personan interkonatiĝon.

6. Daŭraj kontaktoj per "Forstista Informilo"

Komence de la jaro 1982, kiam kelkaj interesuloj aktive eklaboris pri la vortaro, pli poste nomita Ls, ili ankaŭ decidis, eldoni cirkuleron por informado kaj varbado. Tiu ĉi "Forstista Informilo" (FI) (1) fariĝis daŭra organo de la komunumo de la respektivaj forstistoj, kiu pli poste nomiĝis "Internacia Forstista Rondo Esperantlingva" (IFRE). IFRE ĉiam konsideris la vortaran laboron kiel ĉefan agadkampon, sed malfacilaĵoj, atingi juran staton, ne povis esti venkitaj. Post la fonda de la "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre'" oni baldaŭ trovis konsenton, daŭrigi FI kiel komunan organon en kvar lingvoj. Tiel FI fariĝis solida "kontaktilo" inter la centralo de la Ls-projekto kaj ĉiuj kunlaborantoj sendepende de ilia lingvo.

7. Formoj de "Lexicon silvestre"

Kadre de la ĉiujaraj aranĝoj ofte oni diskutis pri la plej celtaŭgaj formoj de eldono de Ls, kaj kelkaj formoj estas provitaj.

Por la multlingva Ls kun difinoj (kiel provekzempleroj en 1992) ni ne trovis eldonejon, kiu ne postulis multmilojn da markoj kiel antaŭpagon.

Ekde 1995 ni eldonas Ls forme de unulingvaj versioj. La samaj kurantaj nombroj de la nocioartikoloj en ĉiuj volumoj estas la ligo inter la diversaj lingvaj versioj. Uzanto bezonas aĉeti nur tiujn ĉi versiojn, kiujn ŝi/li uzas.

Kiel elektronikan formon ni ofertis en 1993 plurlingvan formon de Ls sur diskedoj. Sed alvenis nur malmulte da mendoj. La multnombro da datoj postulis kelkajn kompromisojn, tiel ke la atingotempoj sur diskedoj estis tro longdaŭraj. Planita estas eldono de Ls sur CD-ROM. Nuntempe ankoraŭ ne estas programisto en la centralo, kiu povas solvi tiun ĉi taskon.

8. Varbado

Ekzistis ĝis nun kelkaj diversaj vojoj, sur kiuj la centralo realigis la varbadon por Ls:

- Informo per listo de la noveldonitaj libroj de "Börsenverein des Deutschen Buchhandels"
 - Publikigo de artikoloj pri Ls en fakrevuoj inkluzive de FI
 - Sendo de leteroj kun oferto al fakbibliotekoj kaj elektitaj fakuloj
 - Ekspozicio de afiŝoj dum grandaj fakkunvenoj
 - Prezento de prelegoj dum kunvenoj
- Rezulto de enmetado de "home page" en Interneton ĝis nun ne ekzistas.

Recenzoj en fakrevuoj sukcesis, sed sendo de recenzo-ekzempleroj al redakcioj de fakrevuoj preskaŭ ne estis efektivaj.

9. Proponoj de projektoj

Pro provizado de la Ls-projekto per financaj rimedoj estas uzitaj multaj vojoj. El la dekoj da proponoj estas akceptitaj nur du proponoj en 1991 kaj 1993 de Laboroficejo Eberswalde. Laŭ la enhavo la Ls-projekto estas propradire afero de la Eŭropa Komunumo. Manko da financaj rimedoj estis la argumentado pri la malakceptoj. Sole la FAME-fondaĵo donis en 1993 fincan donacon.

La Ls-projekto rilate la financojn vivas ĉefe helpe de donacoj de asocioj de la "Patrona Asocio".

10. Rolo de Esperanto en la "Lexicon silvestre" - projekto

Jam pli supre estas menciita, ke estis esperantistoj, kiuj estis la iniciatintoj de la Ls-projekto kaj ankoraŭ ili estas diligentaj kunlaborantoj. La laboro estis tre fekundigita per la partopreno de kelkaj kunlaborantoj en terminologia kurso, kiun aranĝis en 1986 la Esperanto-Asocio de ĈSSR kune kun la Terminologia Centro de UEA (9).

Ĝis 1983 la esperantlingvaj difinoj estis en la antaŭo ĉe la laboro pri Ls. Post la pligrandiĝo de la aŭtoraro per ne-esperantlingvanoj, la difinoj, konforme al la eblecoj de la kunlaborantoj, estas tradukataj ne sole el Esperanto, sed ankaŭ el aliaj lingvoj, samsence en aliajn lingvojn. Sed ĉiam denove oni devas kontroli helpe de la esperanta versio, por ke esprimi plej ekzakte la fiksitajn nocienhavojn en ĉiu lingvo.

Evidentiĝis: Esperanto el ĉiuj lingvoj taŭgas plej bone por unusencaj difinoj. Tiel estas kompreneble, ke Esperanto funkcias kiel gvidlingvo por Ls. Tio gravas senpere nur por la kolektivo de la prilaborantoj. Nerekte rezultas el tio por la uzantaro pli fidinda versio de difinoj. Por la uzantoj nur gravas la rezulto, ne la produktadmaniero.

Por la preparo de la esperantlingva versio de Ls necesis okupi sin pri la reguloj de la Esperanto-vortfarado, kiel ilin evoluigis KALOCSAY kaj WARINGHIEN (2). ULLRICH (8), la estro de la Terminologia Komisiono de IFRE, konkludis, ke ne en ĉiuj kazoj tiuj ĉi reguloj sufiĉas al la bezonoj de racia lingvologia terminofarado. Li proponis uzi ankaŭ en Esperanto liberan vortfaradon kaze de neceso. Oni povas konstati, ke en kelkaj lingvoj akceliĝas la tendenco de utiligo de vortkunmetaĵoj kun uzo de listreketoj. Tiujn ĉi kunmetitajn unu-vortajn substantivajn terminojn oni preferu pro lingvo-ekonomiaj kaŭzoj en la Esperanto-faklingvo.

Pri novaj vortradikoj en la "Sekunda pars" de Ls kaj la efiko de la plurlingveco de Ls sur esperantlingvaj terminoj estos raportata en plia kontribuo.

11. Literaturo

- (1) Forstista Informilo, Eberswalde 1982, ISSN 0949-9830.
- (2) KALOCSAY, K., WARINGHIEN, G.: Plena analiza gramatiko de Esperanto. 4a eld. UEA Rotterdam 1980.
- (3) SIMON, Karl-H.: Lexicon silvestre, Vortaro de Forsta Fako, Dictionary of Forest Affairs. ISBN 3-931 262-00-6.
- (4) SIMON, K.-H., ULLRICH, I., WECKWERTH, H.: "Lexicon silvestre, Prima pars" kun novaj vortradikoj. Sci. Rev. 45 (1994)(2) -165.
- (5) Terminologia Forestale. Science Forestali, Technica, Practica e Prodotti Forestali. Red. da G. Bernetti e.a.; Firenze 1980, 518 p.
- (6) Terminologie Forestière. Sciences forestières, Technologie, Pratiques et Produits forestiers, réd. A. Metro; Paris 1975, 432 p.
- (7) Terminology of Forest Science, Technology Practice and Products. Ed. Ford-Robertson, F.C.; Society of American Foresters, Washington DC. 1971.
- (8) ULLRICH, I.: Ĉefaj principoj por la fiksado de forstfakaj terminoj en Esperanto kaj la vidpunkto de libera vortfarado ĉe kunmetitaj substantivaj terminoj. Forstista Informilo (Eberswalde), 32(1995), Aldonaĵo 4.
- (9) WERNER, J.: Terminologia kurso. Sdružený klub ROH, Roudnice n.L. 1986.
- (10) WÜSTER, E.: Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik. Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung. Berlin: VDI-Verlag, 1931, 431 p.

Förderverein "Lexicon silvestre" e. V. Dr. Karl-Hermann SIMON
c/o Fachhochschule Eberswalde, Bibliothek, Schicklerstrasse 3-6
DE 16225 EBERSWALDE
GERMANIO

Tel. +49-3334-6570 / Fax: +49-3334-657125

E-Mail: khsimon@fh-eberswalde.de